



共同

話語

Mikrofone

6-a jaro • Aprilo-Junio, 2008

- Wenchuan, la tuta mondo kune kun vi
- Nepre fiaskos ĉia agaĉo spliti Tibeton disde Ĉinio





Enkonduko

La 12-a de majo, 2008 estas malĝojiga tago por ĉinoj. Tiutage en Wenchuan, gubernio de la ĉina sudokcidenta provinco Sichuan, okazis 8-gradaj tertremoj, en kiu viktimitiĝis pli ol 69 miloj da homoj. Ĝi estas la plej granda natura katastrofo post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Dum la funebraj tagoj ni ricevis multajn leterojn kaj mesaĝojn de niaj legantoj kaj aŭskultantoj, kiuj diversmaniere esprimis konsolon kaj kondolencon al la ĉina popolo. Multaj landoj kaj regionoj donis malavarajn helpojn, ĉu mone ĉu materiale. Kun la granda subteno de la tuta mondo, la plagita regiono certe plenumos reconstruadon.

La 14-an de marto en Lasao, ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio, okazis perforta atakado instigita de Dalai-Lamao. Fakte Dalai-Lamao jam antaŭlonge planis utiligi la Pekinajn Olimpikojn por internaciigi la tiel nomatan “tibetan problemon”. Li prenis la sportan solenadon de la 29-aj Someraj Olimpikoj en Pekino kiel la “lastan ŝancon” por tiri la internacian atenton al Tibeto, esperante, ke la centra registaro ne prenu rimedon kontraŭ lia secesiiga agaĉo. Kompreneble li eraris. Neniu registaro permesas ian ajn atenton al la suvereneco de la ŝtato. Sed estas ridinde, eĉ indignige, ke iuj okcidentaj amaskomunikiloj justigis la atakadon kaj kondamnis la ĉinan registaron sub la preteksto de “homaj rajtoj”, farante neverajn raportojn, eĉ kun falsitaj fotoj. Ĉu tio estas justa? Mi iam restis en Eŭropo dum pluraj monatoj kaj, televidante de tempo al tempo, ricevis nur ege negativajn raportojn pri Ĉinio. Fine mi komprenis, kial multaj eŭropanoj ne povas aŭtente koni la rapide disvolviĝantan Ĉinion kaj en ilia imago Ĉinio estas tute alia lando ol la reala. Eĉ en iuj lastatempaj Esperantaj revuoj aperis artikoloj kalumniaj al Ĉinio, sen observi la neŭtralecon de esperantisto kaj justecon de ĵurnalisto. Oni rajtas ne ŝati Ĉinion, sed oni ne rajtas fari kalumnion.

Baldaŭ okazos la Pekinaj Olimpikoj kaj Paralimpikoj. Venu al Pekino por sperti la sportan solenon kaj propraokule vidi, kia estas la vera fizionomio de Ĉinio!

Sincere via,

Jianping Zhao

Anonco pri konkurso

Bonveno al la Konkurso de turismaj scioj “Ĉarma Guangxi”

Ĉi-jare estas la 50-a datreveno de la fondiĝo de Guangxi-a Zhuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. Por ke vi pli bone konu la atingojn en ekonomio, socio kaj aliaj flankoj de Guangxi en la lastaj 50 jaroj, Ĉina Radio Internacia kaj la aŭtonoma regiono kune okazigos Konkursan de turismaj scioj “Ĉarma Guangxi”.

Koncerne al la Konkurso ni jam elsendis la 5 artikolojn en

majo kaj elmetis en ĉiu artikolo du demandojn respektive. La ripeto de la artikoloj okazos de la 9-a ĝis la 13-a de junio. La lasta ripeto okazos de la 25-a ĝis la 29-a de aŭgusto. La limdato de la konkurso estas la 6-a de oktobro, 2008. Ni bonvenigas vin aŭskulti ĝustatempe. La artikoloj kaj demandoj troviĝas en nia retejo. Oportune al via partopreno, ni sendos al vi afrankitan koverton kun la demandoj.

Same kiel antaŭe ni establas

premiojn specialan, unuan, duan kaj trian. La dek gajnintoj de la speciala premio senpage vojaĝos dek tagojn en Ĉinio meze de venonta decembro.

Nun okazas samtempe la foto-konkurso de nia redakcio kaj la Konkurso de Turismaj Scioj “Ĉarma Guangxi” de nia Radio. Ni vin dankas anticipi pro la fervora partopreno kaj deziras al vi sukceson!.



Wenchuan, la tuta mondo kune kun vi



Je la dua horo kaj 28 minutoj posttagmeze de la 12-a de majo, okazis en la gubernio Wenchuan de la provinco Sichuan 8-grada tertremo, kiun sentis ne nur plej multaj lokoj de Ĉinio, sed ankaŭ Vjetnamio kaj Tajlando diversgrade. La tertremo estas la plej granda natura katastrofo post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en la pasintaj preskaŭ 60 jaroj. La tertremo kaŭzis grandan perdon de la vivo kaj posedaĵoj de la popolanoj de la plagitaj regionoj. Laŭ statistiko, ĝis la 16-a de junio, la tertremo kaŭzis morton de pli ol 69 miloj da homoj, pli ol 370 miloj vundiĝis kaj malaperis pli ol 17 miloj.



Por esprimi profundan funebron al viktimoj de la fortega tertremo, la ĉina Ŝtata Konsilantaro decidis okazigi tutlandan funebron por viktimoj en la tertremo, de la 19-a ĝis la 21-a de majo. Dum la tri tagoj haltis stafetado de la olimpika torĉo, estis duonhisita la nacia flago en la tuta lando kaj ĉesis la publika amuzado.



La funebrado sur Tian'anmen-placo

Tuj post la tertremo, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, ĉina ŝtata prezidanto kaj prezidanto de Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Hu Jintao, ŝtata ĉefministro Wen Jiabao kaj aliaj gvidantoj sinsekve venis al la plagitaj lokoj por konsoli plagitojn kaj gvidi savadon kaj kontraŭterterman



laboron.

Tuj post la tertremo, diversaj lokoj de la ĉeftero, Hongkong, Aomen, Taiwan kaj elmigrintaj ĉinoj kaj ĉindevenaj fremdlandanoj senavare donis helpon finance, materiale kaj homforte. La tertremo vekis grandan zorgon kaj atenton ankaŭ de la internacia socio kaj diversaj landoj inkluzive de la monda esperantujo. Ŝtatestroj de multaj landoj, gvidantoj de la internaciaj kaj regionaj organizoj sendis telegramojn al la ĉinaj gvidantoj por esprimi kondolencon, konsolon kaj subtenon al la ĉina popolo. Koran dankon al Belgio, Britio, Francio, Germanio, Japanio, Korea Respubliko, Kubo, Nederlando, Pakistano, Rusio, Saudi-Arabio, Singapuro, Usono, Venezuelo kaj multaj aliaj landoj, kiuj liveris diversflankajn subtenojn kaj helpojn, inkluzive de medicinaj kaj vivsavaj taĉmentoj! Apartan dankon al Lee Myung Bak, prezidento de Korea Respubliko kaj Ban Ki-moon, ĝenerala sekretario de UN, kiuj speciale flugis al plagitaj regionoj por inspektado kaj konsolo!

Post la tertremo, iuj internaciaj E-organizoj, landaj



E-asocioj kaj organizoj kaj diverslandaj aŭskultantoj sinsekve sendis mesaĝojn esprimante kondolencon al viktimoj kaj konsolon al la plagitoj.

Prezidanto de UEA Probal Dasgupta esprimis: "Mi aliĝas al la bedaŭresprimoj de Renato, Hori-san kaj aliaj pro la lastatempaj naturkatastrofoj. Por peti aktivigon de la Fondaĵo ĉe UEA, oni bonvole skribu al la direktoro de la Centra Oficejo Osmo Buller: direktoro@co.uea.org. Necesos sufiĉe precizaj detaloj por ke la helpo rapide atingu esperantistojn-viktimojn."



Eksprezidanto de UEA Renato Corsetti skribis: "Mi aliĝas malfrue al ĉiuj bedaŭro-esprimoj pri la tertremo en Ĉinio. Mi mem bedaŭras, ke ni povas fari nenion por helpi en ĉi tiu situacio. Bonvolu memori ĉiam, ke ekzistas Fondaĵo ĉe UEA por helpi esperantistajn viktimojn en tiaj okazoj."

Nome de koreaj esperantistoj, prezidanto de Korea Esperanto-Asocio PARK Wha-Chong skribis en la konsola mesaĝo: "Ni, koreaj esperantistoj estas ŝokitaj de la terura tertremo en Ĉinio. Ni kun granda malĝojo, konsolas ĉinajn popolanojn, kiuj perdis karajn familianojn kaj estas damaĝitaj de la tertremego. Ni deziras, ke la suferantaj homoj estu kuraĝaj por revigligi sian vivon."

Estrarano de UEA pri landa kaj regiona agadoj kaj eksprezidanto de KAEM HORI Yasuo esprimis: "Mi spektas televidajn novaĵojn kun maltrankvilo pro la pliiĝanta nombro de viktimoj. Ĉesigu ĉiujn militojn kaj direktu nin al Birmo kaj Ĉinio por savi la viktimojn!"

Ĝenerala sekretario de VEA Nguyen Xuan Thu skribis: "Vjetnamaj esperantistoj esprimas



sian sinceran kaj fratecan kondolencon al la ĉina esperantistaro kaj al la familianoj de la viktimoj de la terura tertremo okazinta en Ĉinio."

Prezidanto de DEA Ileana Schröder skribis: "Dana Esperanto-Asocio esprimas ankaŭ siajn kondolencojn al la viktimoj en la tertremo kaj konsolon al iliaj familianoj!"

Karine Arakelja, ĉefdirektorino de Armena Kultur-Kleriga Centro "Espero" skribis en sia mesaĝo: "Vi vere estas fortaj kaj kapablaj venki ĉiujn malfacilaĵojn kaj malfeliĉojn! Multaj homoj de la mondo estas anime kun vi kaj kunsentas vian doloron. Neniu katastrofo kaj plago povas subigi popolon, kiu volas vivi! Tion diras al vi reprezentanto de la popolo nek unu fojon renaskiĝinta el cindro. Kaj pri tio diras ankaŭ la vortoj el viaj poemoj. Eterna memoro al homoj foririntaj. Sukceson, feliĉon kaj brilan estontecon al ĉiuj, kiuj havas ankoraŭ multon por fari en tiu ĉi vivo!"

Kondolencojn kaj konsolojn sendis ankaŭ prezidanto de Armena Esperanto Asocio Levon Davtjan, prezidanto de Irana Esperanto-Asocio Ahmad



Reza Mamduhi, vicprezidanto de Japana Esperanto-Instituto SIBAYAMA Zyun'iti, Aragao, Wolmar, Vicente, Fernando kaj aliaj de la Kapiŝaba Esperanto-Klubo el Brazilo kaj aliaj.



Mesaĝojn kun kondolenco kaj konsoloj sendis ankaŭ diverslandaj aŭskultantoj. Post aŭskulto de novaĵoj kaj raportoj pri la terura tertremo, ili sinsekve esprimis bedaŭron kaj dolorsentojn. Jiří Patera el Ĉeĥio ĝenerale kontaktiĝas kun ni letere kaj ĉifoje ankaŭ li sendis retmesaĝon, esprimante: "Mi tre bedaŭras la perditajn vivojn, precipe la vivojn de infanoj kaj gejunuloj. Mi firme kredas, ke la ĉina popolo kaj la ŝtataj aŭtoritatuloj ĉiamaniere helpas al la plagitoj kaj certigos la baldaŭan renovigon de la damaĝita regiono." Hans kaj Marjet Erasmus el Nederlando skribis en la mesaĝo: "Laŭdindaj estas la brila organizado kaj kunlaboro de viaj samlandanoj! Espereble via lando estu ekzemplo por najbara lando Birmo, kie la situacio estas ankaŭ korŝira." Renata Chasard el Francio esprimis: "Mi ne forgesas vin! Pro la malbonega periodo por via tuta lando, mi volas esprimi al vi ĉiuj mian sinceran simpatian, kaj deziri rekonstruadon por la multnombraj trafitaĵoj homoj, familioj. Necesos fortoj, pacienco kaj tempo por la rekonstruado. Vi jam kalkulas nombron da tagoj ĝis la Pekinaj Olimpikoj, kiuj certe renkontos belegan

sukceson.”

Konsolojn kaj bondezirojn sendis ankaŭ Abel WEINER el Aŭstrio, Saliko el Finnlando, Keyhan Sayadpour el Irano, Lee Jung-kee el Koreio, Dinko Matkovic el Kroatio, Katrin kaj Ru Bossong el Nederlando kaj multaj aliaj. Ni kore dankas ĉiujn skribintojn.

La granda tertremo povas ruinigi domojn, detruvi vojojn, pontojn kaj montojn kaj rabi la vivon de la familianoj de la plagitoj, sed ne povas detruvi la firman volon de la granda ĉina nacio. En la pasinta unu monato, Ĉinio gajnis grandan atingon en la savado kaj ĉiuj kontraŭterremaj laboroj. Nun la kontraŭterrema laboro turniĝas de grandskala urĝa savado al postterrema rekonstruado. Ĉinio restarigos normalan funkciadon de turismaj vizitindejoj en tertreme plagitaj regionoj. Ankaŭ la provinco Sichuan restarigos la turisman merkaton en 13 urboj kaj gubernioj de la provinco. Multaj entreprenoj kaj fabrikoj en la plagitaj regionoj jam restarigis produktadon.



Nun pli ol 130 miloj da ĉinaj armeanoj kaj armitaj policanoj forte, kunorde kaj efike batalas daŭre sur la unua fronto. En la pasinta pli ol unu monato post la katastrofo, ili ĉiurimede savis postvivantojn laŭ la instrukcio de ĉefministro Wen Jiabao: “La plej grava tasko estas savi postvivantojn. Se ekzistas ankoraŭ 1% da espero, do ni faru cent-procentan klopodon!” Kaj nun ili transloĝigas popolanojn, preventas sekundarajn katastrofojn, monitoras tertreme formitajn lagetojn, faras kontraŭepidemian preventadon kaj donas psikan konsolon kune kun la medicinaj taĉmentoj kaj

volontuloj.

De post la kruela tertremo, neniam ĉesis helpo kaj subteno al la plagitaj regionoj. Nun diversaj lokoj de Ĉinio aktive akceptas lernantojn el tertreme plagitaj regionoj kaj liveras aliajn helpojn. Diversaj altlernejoj faras planon pri rezervo por varbi



studentojn el tertreme plagitaj lokoj. En Pekino kaj diversaj lokoj de Ĉinio, oni okazigas daŭre beneficajn prezentadojn, en kiuj artistoj- kaj sportistoj-steloj kaj entreprenistoj kontribuis monon helpe al la plagitaj popolanoj. Ordinaraĵoj, de infanoj ĝis maljunuloj, daŭre kiel eble plej multe helpas suferantojn per mondonaco. Amo, zorgo, helpo kaj subteno inter homoj karesas la ŝiritajn korojn kaj donis kuraĝon kaj esperon al la popolanoj de la plagitaj regionoj. Kaj cetere, la firma memfido kaj persisteco de la savitoj kaj la nefleksebla kaj nesubigebla spirito de plagitoj kortuŝas la tutan Ĉinion kaj la mondon. Ban Ki-moon, ĝenerala sekretario de UN, donis laŭdon al la ĉinaj popolanoj pro ilia kuraĝa batalo kontraŭ la natura katastrofo. Li diris: “La ĉina popolo estas granda. Ili sinoferas por helpi aliajn. Ili estas granduloj!”

En la savado kaj kontraŭterrema batalo cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj pri braveco kaj sinforĝesemo spite al danĝero kaj svarmis grandnombro da heroaj kolektivoj kaj individuoj. Antaŭ nelonge, prezidanto





de la Centra Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Hu Jintao subskribis ordonon honorigi iun aeron trupon per titolo “Heroa aertrupo de savado kaj kontraŭtertremo”. La trupo faris elstarajn kontribuojn. Ekzemple, la kvinpersona grupo de la helikoptero n. 734 gvidata de Qiu Guanghua apartenas al tiu ĉi trupo. Qiu Guanghua kaj liaj kolegoj brile plenumis diversajn taskojn. Malgraŭ danĝero en malbona vetero ili 63-foje flugis inter profundaj mallarĝaj montvaloj por transporti vunditojn kaj materialojn, urĝe bezonatajn de plagitoj. Bedaŭrinde, en la 31-a de majo, la helikoptero kraŝis pro densa nubo kaj forta aerfluo kaj ĉiuj grupanoj mortis en la akcidento. Ĝis nun oni ne kuraĝas sciigi la veron al la maljunaj gepatroj de Qiu Guanghua. La kvin martiroj ĉiam restos en nia memoro! Estos baldaŭ elektitaj kontraŭtertremaj geknaboj-herooj el 50 kandidatoj.

Ni kredas, ke helpate de diversaj lokoj de Ĉinio kaj la internacia socio, la ĉina popolo certe venkos naturan katastrofon kaj rekonstruos ankoraŭ pli belan hejmlokon.

Fine de nia konigo pri savado kaj kontraŭtertremo laboro en Wenchuan, ni citu du poemojn de ĉina esperantisto Hu Guozhu, versitajn en la tagoj de la kruela tertremo:

Tutlanda Funebrado

Duonhisata
nacia flago
memoras en tutlanda
funebra tago
pri la kruela
tertrema plago
bravismo en mizeroj
ekster imago

Librosakoj post Tertremo

Vicoj da librosakoj sur ruino!
pensigas al ni pri freŝvigla vivo.
Geknaboj en flor-aĝo de naivo
kial subite falas al vivfino?

Parco nejuste laŭ fatal-destino
falĉas per masakro en efektivo.
Pro la tragedio -- forta motivo --
larmoj vualas al nia retino.

Kvankam doloras la sceno obskura,
tamen ni batalas kun persistemo.
Spite al la katastrofo natura,
Ĉinio luktas kontraŭ la tertremo.
Por pli bela perspektivo futura,
Esperantistoj ĉantas per poemo.



Bruligu Olimpikan Flamon, Pasigu Amikecon tra la Mondo

En la 24-a de marto, antaŭ la ruino de la templo Hera en Olimpio, Grekio, solene okazis ceremonio por ekbruligo de la olimpika torĉo kaj komenciĝis la longa stafetado de la olimpika torĉo. Al la ceremonio ĉeestis greka prezidento Karolos Papoulias, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato Jacques Rogge, prezidanto de la Pekina Olimpika Organiza Komitato Liu Qi kaj aliaj. La stafetado en Grekio trapasis pli ol 40 urbojn kun la partopreno de pli ol 600 stafetoj.



La 31-an de marto, la olimpika torĉo atingis Pekinon el Ateno kaj okazis stafetado-startiga ceremonio sur Tian'anmen-placo. En la 1-a de aprilo, la torĉo komencis stafetadon ekster Ĉinio. Post vojaĝo tra pli ol 20 alilandaj urboj de la kvin kontinentoj kaj pli ol 100 ĉinaj urboj, antaŭtagmeze de la 8-a de majo, alpistoj sukcese plenumis la stafetadon de la olimpika torĉo sur la monda firsto - Ĉomolangma montpinto. Tio estas la unua fojo en la olimpika historio. Nun daŭras la stafetado en diversaj urboj de Ĉinio kaj fine



la torĉo atingos la ĉefkonkursejon en la 8-a de aŭgusto, kiam inaŭguriĝos la Pekinaj Olimpikoj.

Eseo de Ivan Budinov el Bulgario "Pekinaj Olimpikoj en mia koro":

Kiam mi estis knabo, mi ŝatis sporton kaj aparte interesiĝis pri futbalo kaj tradicia ĉina ŭsuo. Mi amas Ĉinion, mi kaj miaj familianoj estas sinceraj amikoj de Ĉinio. Ni persiste aŭskultas Ĉinan Radion Internacian kaj ĉiam zorgas pri ĉio, kio okazas en la granda Ĉinio, precipe pri baldaŭ okazontaj Olimpikoj en Pekino. Mi ege emociiĝis, kiam Ĉinio sukcesis en peticiado de la 29-aj Olimpikoj kaj fariĝis gastiganto de Olimpikoj. Mi kaj mia fratino Rumjana regule vizitas Konfuzian Instituton en Sofio. Ni lernas la ĉinan lingvon, spektas koncernajn filmojn kaj aŭskultas prelegojn pri ĉinaj kulturo kaj historio. Nin aparte interesis la prelego de sciencistino el Bulgara Akademio pri la Muzeo de Terakotaj Ĉevaloj kaj Soldatoj en ĉina urbo Xi'an.

Mi, mia fratino Rumjana kaj mia patrino vizitis ĉinan ekspozicion en Bulgario "Pekino atendas vin" kaj refoje emociiĝis kaj admiras la elstaran preparadon de la ĉina popolo por Pekinaj Olimpikoj. Plaĉas al mi la emblemo kaj la slogano 'Unu Mondo, Unu Songô', min surprizis la mirinda konstruaĵo Birdnesto. Mi precipe ŝatas la talismanojn de Pekinaj Olimpikoj. Mi neniam forgesos la renkontiĝon en ĉina ambasadorejo en Bulgario, kiam la delegacio de ĈRI faris viziton en Sofio, vicdirektoro de ĈRI donacis al mia fratino kompletan da talismanoj de Pekinaj Olimpikoj kaj mia fratino tuj donacis al mi Nini, kiu estas mia favorito.

Kun proksimiĝo de Pekinaj Olimpikoj, kluboj de aŭskultantoj de ĈRI 'Amikoj de Ĉinio' okazigos renkontiĝon, en kiu partoprenos vicdirektoro de la Konfuzia Instituto de ĉina ambasadorejo en Bulgario s-ro Tian.

Kvankam mi estas tro okupata, tamen mi ne povas ne partopreni en via Konkurso de Scioj pri Pekinaj Olimpikoj. Mi bone scias, kiel okupataj vi estas kaj kiom da laboroj la ĉina popolo ankoraŭ devas fari. Mi tutkore deziras al vi sukceson! Mi kredas, ke Pekinaj Olimpikoj certe estos altnivelaj kun distingaj trajtoj en la olimpika historio.

Nepre fiaskos ĉia agaĉo spliti Tibeton disde Ĉinio

En la 14-a de marto, tre malmultaj ekstremuloj kreis perfortan eventon en Lasao, ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono. En la evento ili bruligis lernejojn, detruis hospitalojn, bankojn, instituciojn, ŝtonatakis policianojn, rabis posedaĵojn publikajn kaj privatajn kaj mortigis preskaŭ 20 senkulpajn popolanojn. Ilia senbrida agaĉo kaŭzis grandegan perdon al la vivo kaj posedaĵoj de la popolanoj kaj serioze damaĝis la socian stabilecon en Lasao.




Simila evento okazis ankaŭ en la provinco Gansu, nordokcidenta Ĉinio, kaj aliaj lokoj. Faktoj pruvis, ke tiu ĉi evento estas intence farita de en- kaj eksterlandaj secesiaj fortoj de "tibeta sendependiĝo", organizita, planita kaj instigita de Dalai-kliko. Kaj cetere, la ekstera stafetado de la olimpika torĉo en Londono, Parizo kaj San-Francisko trafis perturbojn kaj ĝenojn. Ĉio ĉi ne estis izolita, sed kompakte ligiĝis kun Dalai-kliko. La celo de la pledantoj por "tibeta sendependiĝo" estas perturbi Pekinajn Olimpikojn, devigi la ĉinan registaron fari koncedon rilate la problemon de "tibeta sendependiĝo" kaj provi spliti Tibeton disde Ĉinio. Pri tio s-ro Joop van der Hoeven el Nederlando sendis al ni karikaturon, skribinte: "Kiam Nederlando floradis ekonomie kaj arte en la 17-a jarcento, estis iu ornamita ŝtono de iu domo en malnova Amsterdamo. Sur ĝi estis latine surskribita "Florado vekas envion". Tiu ŝtono el la pasinteco tre bone respeguligas la sintenon de la atakantoj de la torĉo de Pekinaj Olimpikoj kaj la sintenon de la

promociantoj de la atakoj (La floro estas Ĉinio)!"

Vizaĝe al la forta kondamno de la tutmondaj publikaj opinioj, Dalai-kliko plenforte senkulpigis sin pri la evento. Sed la historiaj kaj aktualaj faktoj, precipe la evento en la 14-a de marto, malkaŝis la mensogon de Dalai-kliko pri "neperforteco".

Bedaŭrinde, ignorante la ferajn faktojn, malmultaj eŭropaj parlamentanoj kaj iuj membroj de usona Kongreso elmetis rezolucion projekton, kiu ne kondamnis la perfortulojn kaj Dalai-klikon, sed direktis lancopinton al la ĉina registaro kaj la ĉina popolo. Tio estas serioza interveno en la internajn aferojn de Ĉinio kaj vekis fortan indignon kaj firman oponon de la ĉina popolo. Krome iuj okcidentaj amaskomunikiloj ĉiurime de faris distordan propagandon pri la evento kaj eĉ suretigis malveran foton, faritan per satelito por kalumnii la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon. Laŭdire la foto estis farita per satelito. Laŭ informo de ĉinaj amaskomunikiloj, fakte la foto estis farita antaŭ kelkaj jaroj de lasaa evento, kiam la soldatoj invitite ludis rolojn de lamaoj en iu filmo. Nun kelkaj soldatoj jam ne plu servas en la Armeo, sed laboras en diversaj lokoj de Ĉinio.



La malvera foto

Fakuloj povas facile trovi la malverecon sur la foto. Ĉi-flanke nia franca amiko Henri Masson skribis en sia mesaĝo: “Tre verŝajne vi ricevis foton, kiu montras ĉintipajn virojn en uniformoj de la ĉina armeo. Ĝi estis laŭdire persatelite farita de brita registara agentejo de komunikado, la 21-an de marto, 2008. Laŭ la komuniko, kiu invitas al laŭeble plej vasta interreta diskonigo, tiuj soldatoj ricevis ruĝajn vestaĵojn de tibetaj monaĥoj por alivestiĝi por krei incidentojn. La celo estis atribui al Ĉinio la tutan kulpon pri la ribeloj en Tibeto.

“Nu, estas fakto, unue, ke tiel preciza foto kun rekoneblaj homaj vizaĝoj, estas neebla per satelito kies perigeo neniam estas sub 200 km (parto de la orbito de satelito la plej proksima al la Tero, ĉar tie, fakte ekde 150 km, ne plu estas aero por bremsi la satelitojn). Plie tiaj fotoj faritaj sub tiu angulo estus ankoraŭ pli malbonaj: persatelita fotado okazas vertikale super la celita areo. Due, montriĝas ke la foto estis farita en 2003 okaze de filmado, do, ne de satelito...”

Ne sola estas la supremenciita malvera foto. Post nelonge, ĉinaj ĵurnalistoj en Germanio rimarkis distordan raporton pri lasaa evento kun alia malvera foto el la televida kanalo N24 de Germanio. La foto estas komputile farita kun rimarkinda kunmetita postsigno, tamen spektantoj malfacile distingus la malverecon. Sur la foto staras kelkaj ĉinaj policianoj kaj lamaoj kun klarigo: “Ĉinaj policianoj observas lamaojn en Pekino”. Ridinda estas tio, ke la policianoj portas uniformojn de malnova fasono antaŭ 10 jaroj.



Malvera foto el la televida kanalo N24 de Germanio

Sed ne sukcesos ĉies intenco atingi neeldireblan celon, utiligante Dalai-klikon. Nepre fiaskos ĉia agaĉo spliti Tibeton disde Ĉinio. La starpunkto de la centra registaro de Ĉinio pri dialogo kun Dalai estas konsekvenca kaj eksplicita; la centra registaro postulas, ke Dalai vere forlasu la tiel nomatan proponon "tibeta sendependigo" kaj ĉesigu iun ajn secesian agon.



Historie Tibeto longtempe troviĝis en feŭda servutula socio kaj vivo de la popolanoj estis tre mizera. Post paca liberigo en 1951, la ĉina centra registaro ĉiam alte atentis tibetan disvolvon, en 2006 ellaboris 40 favorajn politikojn por rapidigi tibetan disvolvon, en 2007 difinis 180 tibetajn planajn programojn kun la totala investo je pli ol 77 miliardoj da juanoj kaj ĉio ĉi akcelis flugrapidan disvolvon de Tibeto en politiko, ekonomio, socio, edukado, medicino kaj aliaj flankoj. Precipe la funkciigo de Qinghai-tibeta Fervojo en 2006 fundamente malstreĉis trafikan problemon bremsantan evoluadon de la tibeta turismo kaj grande akcelis evoluadon de la tibeta turismo. En 2007 Tibeto akceptis pli ol 3 milionojn da turistoj kaj ĉi-jare espereble 4 milionojn.

Nun en gvidantaro de tibetaj gubernioj kaj vilaĝoj, la nombro de funkciuloj el tibeta kaj aliaj minoritataj naciecoj superas 80%, tio atestis, ke tibetaj popolanoj estas mastroj de siaj propraj aferoj. En la lastaj pli ol du jaroj Tibeto ĉiufanke plibonigis loĝejan kondiĉon de kamparanoj kaj paŝtistoj, pli ol 590 mil kamparanoj kaj paŝtistoj loĝas komforte. Nun en Tibeto, ekzistas pli ol 1 700 religiejoj, la nombro de monaĥoj en temploj superis 46 mil, kaj tibeta religia kredo estas



libera kaj plene garantiata la religia aktivado. Estas fundamente garantiataj ankaŭ la rajtoj de tibetanoj pri ekzistado kaj disvolvo.

Post la evento, multaj aŭskultantoj sendis al ni mesaĝon, esprimante zorgon kaj maltrankvilojn. Ekzemple, ĉefkomitatano de IFEF, aŭskultanto Jindřich Tomášek el Ĉeĥio skribis en sia mesaĝo: “Kun malĝojo mi aŭskultis pri maltrankviligaj okazintaĵoj kaj situacio en Tibeto, precipe en Lasao. Mi esperas, ke tio ne influos la Olimpikojn kaj la stafetan vojon de la olimpika torĉo. Mi kompreneble deziras sukceson por Pekinaj Olimpikoj!” S-ro Petik Janos el Hungario

skribis: “Pekinaj Olimpikoj estas bona ŝanco por Ĉinio prezenti la ekonomian kaj socian prosperojn al la sportistoj kaj turistoj. Mi esperas, ke la evento en Tibeto ne ombrigos ĉi-jarajn Olimpikojn en Pekino.” Ali Kousari el Irano skribis: “Mi multe ŝatas, ke Olimpikoj en 2008 okazos en pacvola lando - Ĉinio.” Amin Najmi el Maroko skribis en la ĉina lingvo: “Kiel via malnova amiko, mi sincere deziras al Ĉinio brilan sukceson en la Olimpikoj. Se estus ŝanco, mi volas fariĝi volontulo por la konkursoj.”

Gratulojn kaj bondezirojn sendis ankaŭ Livia Barth el Argentino, Daniel Dominici Filho el Brazilo, Paul Hewitt el Britio, Savova el Hungario, Bahman Bolouk el Irano, Mitsunori Kawazoe el Japanio, Rainer Haupt el Germanio, Lagutenkov Igor el Rusio, Lars Westman el Svedio, Eduardo Trapani el Urugvajo kaj Manuel Ortega el Venezuelo kaj multaj aliaj.

Karaj amikoj, estu trankvilaj, ĉar la ĉina registaro laŭleĝe kaj ĝustatempe traktis la eventon. Nun stabilas la socia ordo kaj tute normaliga la vivo de la popoloj. Koran dankon pro via zorgo kaj atento!

Resumo pri artikolopeto omaĝe al la 5-jariĝo de Mikrofone

Karaj legantoj, sukcese finiĝis la artikolopeto omaĝe al la 5-jariĝo de Mikrofone. Fine venis preskaŭ 50 kontribuantoj el Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Kongolando, Pollando, Rusio, Svedio kaj aliaj sume preskaŭ 20 landoj. La plej grandaĝa partopreninto estas 95-jara Masatake Morisima el Japanio. Ni kore dankas ĉiujn artikolokontribuantojn. La ĝenroj de la kontribuantoj estas diversaj, rakontoj, prozoj, poemoj kaj aliaj kaj la enhavo estas ampleksa. Krom impresoj, esperoj, proponoj kaj sugestoj kompakte rilatantaj al Mikrofone, estas ankaŭ karmemoroj pri la tradicia amikeco inter la popoloj ĉina kaj koncernaj landoj, neforgeseblaj travivaĵoj en infanaĝo; memorindaj eventoj pri E-Movado de Ĉinio kaj de la mondo, kaj aliaj.

Jen la nomlisto de la premiitoj:

Gajninto de la unua premio

Eleonora Tonkova el Rusio (*Himno al la “Lotuso”*)

Gajnintoj de la dua premio

Kazimiro Krzyżak el Pollando (*Ĉinio – nia espero*)

Lars Westman el Svedio (*Du perloj*)

Gajnintoj de la tria premio

Josefo Kiss el Hungario (*Neforgesebla travivaĵo el mia junaĝo*)

Gennadij Gluĥov el Rusio (*Nia kara “Mikrofone”*)

Lenke Szasz el Rumanio (*Ne rapidigu*)

Varman gratulon al la premiitoj kaj koran dankon al ĉiuj partoprenintoj!

G. Molle: Esperanto estas mia ĉefa arta perilo

En majo de 2008, Gianfranco Molle, fama kaj originala Esperanto-kanzonisto, verkisto, komponisto, kantisto kaj muzika organizanto, afable akceptis intervjuon de Mikrofone. Li naskiĝis la 14an de julio de la jaro 1950 en itala urbeto Roccasecca, kiu malproksimas je 100 km de Romo kaj je 100 km de Napolo. La urbeto estas fama pro flutisto Severino Gazzelloni kaj la granda filozofo Sankta Tommaso D'Aquino.



Mikrofone: Kiel vi vin alproksimigis al nia lingvo Esperanto?

Molle: Mia patro estis advokato kaj politikisto. Li volis, ke mi studu juron. Fakte ankaŭ mi interesiĝis pri juro en la komenco de mia studo en universitato. Sed post 2 jaroj, mi perdis mian emon al tiu fako, ĉar io ŝanĝiĝis en mia vivo. Samtempe mi alproksimiĝis al Esperanto, kiam mia amiko kaj samideano Nino Vessella organizis labortendaron por geesperantistoj en mia urbeto, kie mi vizitis E-kurson. Mi komencis lerni Esperanton en la jaro 1971. Efektive ne estis tro malfacile por mi lerni Esperanton. Mi iomete studis gramatikon kaj lernis Esperanton pere de kanzonoj

survoje de miaj rondvojaĝoj en Eŭropo. La simileco de E-radikoj al tiuj de la itala lingvo iamaniere helpas min, sed samtempe mi devas singardi pro la falsaj “amikoj”, ĉar okazas, ke iuj vortoj havas alian signifon ol tiu en la itala.

Mikrofone: Kion signifas Esperanto por vi?

Molle: Esperanto estas definitive parto de mia vivo. Ĝis nun ĝi estas presita sur mia haŭto kaj mi konsideras ĝin kiel la trian denaskan lingvon kaj mian ĉefan artan perilon. Mi ŝatas la E-vivon. Estas facile paroli kun homoj de diversaj nacioj per la komuna amika lingvo Esperanto sen pruntepreni alian fremdan lingvon.

Mikrofone: Kiel vi fariĝis internacie konata?

Molle: Mia unua E-kanto estis “La Vojo” verkita de Zamenhof kaj mi donis modernan veston al la kanto. Mi fariĝis internacie konata ĝuste per la kanto en 1975, al kiu sekvis “Horo da Opozicio” kun Giulio Cappa en 1978.

Mikrofone: Laŭdire viaj kantoj ofte temas pri politiko kaj pri la socio. Ĉu viaj kantoj havas ankaŭ aliajn sencojn?

Molle: Miaj kantoj foje temas pri politiko, foje pri E-vivo, foje pri intimaj sentoj. Mi prenas kanton “La Kanto de Manjo” kiel ekzemplon. Ĝi estas belega amkanto. Kvankam ĝi estas preskaŭ fabelo, tamen temas pri amo inter knabino kaj knabo.

Mikrofone: Viaj kantoj estas popularaj kaj ŝatataj de granda nombro da esperantistoj. Ĉu vi povas rekomendi al ni iujn el viaj kantoj?

Molle: Jes, kompreneble! “La Vojo”, “Horo de Opozicio”, “La Kanto de Manjo”, “Princino”, “La Flut-Muzikisto”, “Franca Majo” kaj tiel plu. Tiuj kanzonoj estas verkitaj plejparte de itala aŭtoro Fabrizio De Andrè kaj tradukitaj plejparte de Renato Corsetti, kiu kapablas en tradukado.

Mikrofone: Ĉu vi vin multe dediĉas al komponado?

Molle: Fakte mi ŝatas komponi novajn kanzonojn. Fariĝinte esperantisto, mi klopodis preskaŭ tuj fari tion en Esperanto, ĉar mi sentis min kapabla verki tekston. Mi prunteprenis versojn el esperantistoj-poetoj.



Mi komenciĝis unue per “La Vojo” de Zamenhof, ne sciante, ke jam ekzistis muziko por ĝi, poste per poezio “Vjetnama Patrino” de japana poeto Uejama Masao, trie “Verda Ĉapo” de Vittorio Dall’Acqua kaj kvare “Samtempaj Sezonoj” de Julius Baghy.

Mikrofone: Ĉu vi faras kunlaboron kun aliaj homoj?

Molle: Jes. Mi kunlaboris kun muzikistoj kiaj Olivier Tzaut, Jaques Le Puil, Giulio Cappa, Marcella Fasani kaj Susanna Castelviva. Mi kunlaboris ankaŭ kun verkistoj kiaj Renato Corsetti kaj Claude Piron. Renato Corsetti estas mia oficiala tradukisto kaj fojfoje verkas ankaŭ originalajn tekstojn. Claude Piron donis grandan kontribuon al Esperanto per libroj kaj per ideoj, kiujn li donis al E-movado. Menciinde, li estis ankaŭ kantisto krom psikologo, lingvisto kaj esperantisto. Li havis interesan voĉon kaj kompreneble mem tradukis kantojn de sia repertuaro. Estas nekredeble, ke oni ne scias lian belan voĉon. Mi konis lin en Svislando kiam mi iris tien por registri “Karnavaletto”. Tiam ni decidis registri kanzonojn tradukitajn de Claude Piron mem en Romo. La fina laboro estis kasedo “Frandu Piron”, kiu vort-ludis kun lia familia nomo Piron.

Mikrofone: Kiel fama E-kanzonisto, ĉu vi havas bonan kunlaboron ankaŭ kun Vinilkosmo?

Molle: Fakte mi bone konas Floreal, estron de Vinilkosmo. Lia laboro por E-muziko estas mirinda, altvalora kaj nekomparebla en E-movado. Li multe sin dediĉas al E-kanzonoj. Multaj kantistoj iras al li por registri diskojn. Tamen mi neniam faris kanzonojn kune kun Vinilkosmo. Mi renkontis Floreal en Tolosa antaŭ kelkaj jaroj, tiam li invitis min kanti en lia urbo

kaj demandis min, ĉu mi havas novajn kantojn por registri. Mi povus efektive registri ĉe li, sed mi preferas fari kanzonojn proksime al mia urbo, kie mi havas la eblecon tion fari kun amikoj, kiuj volonte ludas por mi. En la lasta disko partoprenis la muzikgrupo nomata “Muzikistoj el Lazio”, kiuj profesie ludas kaj volonte partoprenas al mia laboro.

Mikrofone: Ĉu vi kontribuis vian voĉon en E-aktivadoj?

Molle: Jes. Dum mia vivo mi partoprenis en E-aranĝoj ekde la jaro 1971. Ekzemple mi partoprenis en junulara kongreso en Danlando en la jaro 1975. Tiam dum vespero dediĉita al nekonataj kulturoj, mi proponis prezenti kanzonojn kiaj “La Vojo”, “Verda Ĉapo”, “Samtempaj Sezonoj” kaj “Vjetnama Patrino” kiel “el ne tre konata kulturo: Esperanto”. Tio estas la unua fojo por mi kanti kanzonojn en Esperanto antaŭ la publiko. Tio estis granda sukceso. Hodiaŭ tiuj, renkontitaj de mi, ankoraŭ diras al mi, ke ili estis kaptitaj de miaj kanzonoj kaj alproksimiĝis al Esperanto.

Mikrofone: Ĉu vi ankoraŭ aktivas en E-scenejo?

Molle: Fondinte komercan entreprenon kaj baldaŭ edziĝinte, mi dum kelkaj jaroj ne plu aperis en Esperantujo. Nuntempe mi revenas! Mia edzino pasintecce ĉiam rifuzis Esperanton, ĉar ŝi opiniis, ke Esperanto estas ne utila. Sed ŝi iom ŝanĝis sian sintenon kaj nun partoprenas renkontiĝojn kun esperantistoj.

Mikrofone: Ĉu vi povas babilu pri via futura plano?

Molle: Nun mi preparas novan diskon kun novaj originalaj kanzonoj. Mi esperas baldaŭ eldoni ĝin. La venonta KD precipe temos pri intimaj sentoj sed ne mankas prisociaj kantoj. Verŝajne mi kantos en la 93-a UK en Roterdamo. Mi esperas renkonti vin tie. En la fino, mi deziras,



ke la mondo estu pli bona kaj pli paca kaj nia lingvo Esperanto estu la lingvo de ĉiuj homoj sur la tero.



Tra la Mondo - 世界各地

Bonvenon al la 64-a IJK en Hungario

La 64-a Internacia Junulara Kongreso okazos en la urbo Sabatejo (Szombathely), Hungario, inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto, 2008. La ĉeftemo de la Kongreso estas Minoritataj rajtoj. Oni organizos karavanon el la ĉi-jara UK al IJK.

Laŭ informo de Łukasz Żebrowski, la 65-a Internacia Junulara Kongreso okazos en la ĉeĥa urbo Liberec inter la 18-a kaj 25-a de julio 2009, ĝuste antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, Pollando. La kongreson organizos ne unu, kiel kutime, sed tri landaj sekcioj ĉeĥa, germana kaj pola, ĉar Liberec situas en la regiono, kie kuniĝas landlimoj de tiuj tri landoj.

El tejo tutmonde

Esperantistoj por la nova Nacia Biblioteko en Prago

En Prago estas preparata konstruado de nova edificio de la Nacia Biblioteko, ĉar la ĝisnuna biblioteko estas jam preskaŭ plenplena kaj ne sufiĉos por baldaŭaj bezonoj.

Same kiel en la konstruado de la Nacian Teatron en Prago antaŭ cent kvardek jaroj, en la konstruado de la la Nacia Biblioteko, oni liveris angulŝtonojn el ĉiuj anguloj de Ĉeĥio por emfazi la gravecon kaj la tutlandan signifon.

Kaj esperantistoj ne restas flanke. La 13-an de majo ili oficiale transdonis al la vicdirektoro de la Nacia Biblioteko la aparte preparitan angulŝtonon kune kun oficiala Donac-dokumento. S-ano Zdeněk Myslivec gravuris sur la ŝtontabulo la mapon de la Ĉeĥa respubliko kaj la ĉeĥlingvan surskribon "Esperantistoj

de ĈR". Do ankaŭ la Esperanta ŝtontabulo havos tiesian lokon.

La oficialan transdonon de la angulŝtono filmis la Ĉeĥa televido kaj prezentis ĝin la 17-an de majo en la ĉefa vespera inform-programo.

Jiri Patera el Ĉeĥio

332 koreaj studentoj komencis lerni Esperanton

332 koreaj studentoj komencis lerni Esperanton de la unua semestro de la lernojaro 2008 respektive en tri koreaj universitatoj en la orboj Seulo, Yongin, Chonan kaj Iksan. Esperanto estas instruata oficiale kiel unu el la klerigaj lerno-objektoj. Dum la lecionoj, la studentoj provas paroli en Esperanto per Skajpo (Skype). Kursogvidanto estas LEE Jung-kee.

LEE Jung-kee

Espero por infanoj

Eble malmulte scias pri la bieno-lernejo kun internulejo Bona Espero en Brazilo. Bona Espero estas ne-registara organizo, fondita de ses brazilaj esperantistoj en 1957, el kiuj du, malgraŭ granda aĝo, ankoraŭ apogas la laboron. Bona Espero donas al la infanoj el malfacilegaj cirkonstancoj vere "bonan esperon", evitigas al ili la sorton de "stratinfaoj" sen perspektivo, malsataj kaj ofte krimemaj.

En 1974, berlinanino Ursula Grattapaglia kun sia edzo Giuseppe decidis forlasi Eŭropon kaj dediĉi sian pluan vivon al la bonfarto de brazilaj infanoj, transprenante la gvidadon de la la institucio. Jen Blanke Detlev (kun okulovitroj) kaj Giuseppe (maldekstre de Detlev) inter la infanoj de Bona Espero.

El Esperanto-Infornilo

Mikronovelo – 微型小说



Gustumi Freŝon

Estas sezono gustumi freŝon en la nordo.

Apenaŭ aŭroras, Ferid senbrue ellitiĝas.

Li ne ĝenas la dormantan edzinon, estante ja tia viro, kiu scias dorloti sian virinon. Li volas, ke ŝi pli longe dormu. Kaŭrante antaŭ kameno, li bruligas branĉetaĵon, prenas maizajn spikojn kuiritajn de la edzino hieraŭ vespere kaj varmigas ilin en kuirpoto. Baldaŭ jam 4 spikoj da grajnoj miksiĝas en lia stomako, kaj li frapas la ventron. Jam sata!

Li fermas la pordon kaj ekiras. Li veturas en 4-rada ĉaro de oĉjo Ma. Li vizitas urbon por nenio grava, simple por rigardi stratojn en senokupa tempo.

Tago serena. Sidante en la ĉaro, li gaje zumas improvizitan kanton, "Survoje ĉarma la pejzaĝ' / de l' tre riĉigita vilaĝ'..."

La ĉaro atingas nur la randon de la urbo, ĉar estas malpermesate irigi agrikulturan veturilon en urbon.

Ferid prenas aŭtobuson.

Lia kolo laciĝas pro gapado al grandaj reklamoj kaj afiŝoj, liaj okuloj streĉiĝas kaŭze de ŝikuloj kaj pimpulinoj paŝantaj surstrate.

Sorĉa la urbo.

Ferid plonĝas en magazenon. Li aĉetas eŭropajn kostumojn, kaj por si kaj por la edzino.

Antaŭ ol eliri, li vidas mamzonojn ĉe angulo de la magazeno. Lin altiras diversaj mamzonoj, kiujn elektas multaj urbaninoj.

Li eksentas volupton al la edzino, ke ŝiaj mamoj fariĝu montetoj. Li trotas tien. Sekvas zorga elektado.

Tio kaj surprizas kaj mirigas komizininon, junan kaj tre belan. Ŝia gapado neniel povas forigi Feridon, kiu eĉ metas al si plaĉan pecon sur la bruston, por ĝui aŭ mezuri ĝin. Fine li faras pagon por 2 mamzonoj.

Borborigmoj. Ferid sentas malsaton. En restoracion! Subite lia rigardo trafas tion, ke antaŭ iu butikon oni vendas maizajn spikojn. Aĉetas viroj, virinoj kaj infanoj. Li ja foje aŭdis, ke nunaj urbanoj aparte amas bataton kaj maizon. "Tre bone! Ankaŭ mi estu urbano!" Kaj li paŝas tien.

Li jen rodas, jen mordas, jen maĉas, pli urbane ol urbanoj. Sume jam 4 spikojn. Ĉiuj rigardas lin, iuj eĉ rigardegas, kio tre kontentigas lin; kaj li fiere foriras, lulate de la penso, "Ĉi-foje mi estas jam urbano."

Li hastas al frukta butikon. Aĉetinte fruktojn por sia edzino, li rapidas al aŭtobusa haltejo.

En la ĉaro li unue komentas, "Pasintece urbanoj iris al nia vilaĝo por gustumi freŝon. Sed hodiaŭ mi gustumas freŝon en la urbo. Kia amuzo!" Poste li rakontas, kiel li glutis sume 8 maizajn spikojn. Ĉiuj aŭskultantoj eksplodas per rido.

"Oĉjo Ma, haltu, mi devas viziti necesejon!" li krias, rimarkinte necesejon ĉe la vojo.

Oĉjo Ma haltigas la ĉaron kaj Ferid saltas el ĝi kaj kuras al la necesejo.

"Trompemaj urbanoj! La maizaj spikoj, ne sufiĉe kuiritaj! Pro tio mi gustumas lakson!"

Ridego preskaŭ renversas la ĉaron.

Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondo	kHZ
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: espradio@cri.com.cn

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



CHINA RADIO INTERNATIONAL
中国 国际 广播电台

北京2008年奥运会持权转播商
RIGHTS HOLDING BROADCASTER OF
THE BEIJING 2008 OLYMPIC GAMES

CRInline
Esperanto

<http://esperanto.cri.cn>
(2008年第二期 总第22期)

Tel: +8610 68891940
+8610 68891916
Fakso: +8610 68891164
E-mail: espradio@cri.com.cn
Adreso: Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040